Universala Esperanto-Asocio

# DIVERSTEMA KOMUNIKO

Estrara Subteamo: MOVADO

2014-4 sendita el Budapeŝto la 20an de marto, kun nur teksto.

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

## LA UNUA AMO

Morgaŭ vespere komenciĝos la unua Seminario pri AMO, en Hungario. La entena junulara aranĝo JER havas preskaŭ 50 partoprenontojn, el kiuj dudek anoncis sin por la seminario. Ni provos disponigi materialojn el la Seminario tuj kiam eble, sed konkurencaj taskoj svarmas.




## ETAPO 14 ŜATEBLA

Hodiaŭ estas finpreparita la multesemajne prilaborata afiŝigo de la 14a etapo de la retkurso ‘Esperanto Etape’, libere kaj senpere videbla ĉe www.ilei-mondo.info. Temo de la etapo estas la litero Ŝ, kio malfermas la vojon al svarmo da novaj verboj; ŝatas –on, puŝas –on (vidu la bildon: la kursara artisto estas Gábor Molnár), tuŝas –on, viŝas –on, ŝanĝas –on, kaŝas –on, verŝas –on, kaj netransitive paŝas, kuŝas, kraŝas. La kurso emfazas verbojn kaj iliajn kategoriojn. Vizitoj kaj komentoj bonvenaj. Plie la etapoj 12, 13 kaj 14 nun estas elŝuteblaj kun bildserio en kuntena ZIP-tenujo; ilin vi povos elpaki kaj nutri vian poŝtelefonon aŭ similan komunikilon. Tiel lernantoj povos progresi dum ili vojaĝas.

## ESTRARKUNSIDO SEKVAS

La estraranoj de UEA kunvenos en Roterdamo en la sekva martofina semajnfino, kun ampleksa tagordo. Unu el la temoj estos kiel sekurigi rimedojn financajn kaj laborfortajn por evoluigaj projektoj, kiaj la AMO-progrAMO kaj inform-kampanjoj. Se via Asocio, Klubo aŭ rondo havas temojn por levi aŭ demandojn por starigi, bv. sendi ilin al mi aŭ al alia estrarano, aŭ al la Centra Oficejo. Raporton pri la decidoj kaj diskutoj vi ricevos.

Sufiĉu por nun. Dankon pro viaj streboj kaj laboroj!

Sendita sen alkroĉaĵo kaj sen PDF-versio, mar 20, 2014

240 vortoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

La teksta enhavo de komunikoj el 2015 kaj 2014 (53 plus 52 komunikoj) legeblas ĉe: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF postfarita SMG en la 1t6a de majo 2016 per Nuance Power PDF